La
Aventuroj
de Alico
sub la
Tero

La Aventuroj de Alico sub la Tero
De Carroll, Lewis (Dodgson, Charles Lutwidge), 1832-1898
Ilustrita de la aŭtoro.
Tradukita el la Angla al Esperanto de Broadribb, Donald (Donald Richard), 1933-
Originala Angla manuskripto manskribita en 1864.
Unue eldonita en la Angla kiel Alice's Adventures under Ground de Macmillan & Co Ltd, 1886.
Unue eldonita en Esperanto de Bookleaf Publishing, 1998.
Ĉi tiu traduko kopirajta (c) 1998 de Donald Broadribb. Ĉi tiu eldono estas korektita versio, septembro 2000.
Vidu http://www.netword.com/broadribb
895.9523

La ilustrajoj kaj aranĝo de ĉi tiu eldono laŭeble plej konformas al tiuj de la originala Angla manuskripto de 1864. La litertipo estas "Lewis Carroll", kreita por ĉi tiu libro.


Kristnaska Donaco
al
Kara Infano
Memorige
pri
Somera Tago

Ĉapitro 1

Alicon komencis multe tedi la sidado apud ŝia fratino sur la bordo de la rivereto, kaj la manko de io farinda: unu-du-foje ŝi rigardetis la libron kiun legas ŝia fratino, sed ĝi havis nek bildojn nek konversaciojn, "kaj kia estas la utilo de libro," pensis Alico, "sen bildoj aŭ konversacioj?" Do ŝi konsideradis, en sia menso (laŭeble, ĉar la varmo donis al ŝi grandan senton de dormemo kaj stulteco), ĉu la plezuro de preparo de lekanteto-ĉeno valorus la penon leviĝi kaj pluki la lekantetojn, kiam blanka kuniklo kun palruĝaj okuloj kuris tre proksime al ŝi.

Tio ne estis vere rimarkinda, kaj Alico ne opiniis ke estas <u>tre</u> malkutime aŭdi la kuniklon diri al si, "ve, ve! Mi malfruos!" (poste, kiam ŝi pripensis la aferon, ŝi opiniis ke tio ja estis mirinda, sed kiam ĝi okazis ĉio ŝajnis tute natura); sed kiam la

kuniklo eĉ prenis horloĝeton el la poŝo de sia veŝto, rigardis ĝin, kaj poste plu kuris, Alico eksurpiediĝis, ĉar ŝi ekpensis ke neniam antaŭe ŝi vidis kuniklon kun veŝtopoŝo, aŭ kun horloĝeto kiun ĝi povas preni el ĝi, kaj, plena je scivolo, ŝi rapidis trans la kampon sekvante ĝin, kaj sukcesis ĝustatempe vidi ĝin salti en grandan kuniklotruon sub la heĝo. Post momento Alico sekvis ĝin en la truon, kaj ne eĉ unufoje pripensis kiel ŝi reeliros.

La kuniklotruo iris kelkan distancon rekte kiel tunelo, sed poste eksubeniris, tiom subite ke Alico ne havis momenton en kiu pensi pri haltigi sin, antaŭ ol ŝi trovis sin falanta en kio aspektis profunda puto. Aŭ la puto estis tre profunda, aŭ ŝi falis tre malrapide, ĉar ŝi havis multan tempon dum ŝi falis por ĉirkaŭrigardi, kaj por demandi al si kio poste okazos. Unue, ŝi provis malsupren rigardi por vidi al kio ŝi falas, sed estis tro obskure kaj ŝi povis vidi nenion: post tio ŝi rigardis la flankojn de la puto, kaj rimarkis ke ili estas plenaj de ŝrankoj kaj librobretoj: tie kaj tie estis mapoj kaj bildoj pendantaj de kejloj. Ŝi prenis poton de unu el la bretoj dum ŝi pasis:

la etiketo diris 'Oranĝa Marmelado', sed ĉagrenate ŝi trovis ĝin malplena: ŝi ne volis faligi la poton, timante ke tio eble mortigus iun sube, do ŝi sukcesis meti ĝin en unu el la ŝrankoj dum ŝi falpasis ĝin.

"Nu!" pensis Alico, "post tia falo, min tute ne ĝenos fali suben sur la ŝtuparo! Kiom brava oni kredos min ĉehejme! Mi eĉ ne informus se mi falus de la supro de la domo!" (verŝajne tio ja estis vera).

Suben, suben, suben. Ĉu la falo neniam ĉesos? "Kiom da kilometroj mi falis ĝis nun?" ŝi diris pervoĉe; "sendube mi proksimiĝas al la centro de la tero. Mi kalkulu: tio signifus ke mi falis sep mil kilometrojn, mi kredas—" (ĉar sciu ke Alico lernis plurajn faktojn tiajn en siaj lecionoj en la lernejĉambro, kaj kvankam nun ne estis tre bona oportuno paradi ŝian scion, ĉar neniu ĉeestis por aŭskulti ŝin, tamen estis bona ekzerco memori ĝin), "jes, jen la ĝusta distanco, sed kiun Latitudon aŭ Longitudon mi atingos?" (Alico tute ne sciis kio estas Latitudo, nek Longitudo, sed ŝi

opiniis ke ili estas tre elegantaj vortoj.)

Baldaŭ ŝi rekomencis paroli: "Ĉu eble mi falos rekte tra la teron? Kiom kurioze estos, eliri inter homoj kiuj marŝas kapsube! Sed mi devos demandi al ili pri la nomo de la lando, sciu. 'Pardonu, S-rino, ĉu mi estas en Nov-Zelando aŭ en Aŭstralio?'" —kaj ŝi provis riverenci dum ŝi falis (imagu, riverenci falante tra la aero! Ĉu vi kredas ke vi kapablus?) "kaj kia stulta knabineto ŝi opinios min pro tia demando! Ne, tute ne taŭgos demandi: eble mi vidos la nomon sur afiŝo ie."

Suben, suben, suben: nenio alia estis farebla, do Alico baldaŭ rekomencis paroli. "Dina vere sentos mian mankon hodiaŭ nokte, mi supozas!" (Dina estis la kato.) "Mi esperas ke ili memoros ŝian teleron da lakto je ŝia vespermanĝo! Dina, kara, mi multe volas vin ĉi tie kun mi! Ne estas musoj en la aero, vere, sed eble vi kaptus vesperton, kaj tio estas tre simila al muso, sciu, kara. Sed ĉu katoj manĝas vespertojn, ĉu?" Kaj nun Alico komencis fariĝi iom dormema, kaj ŝi daŭre ripetis al si, kvazaŭ songe, "ĉu

katoj manĝas vespertojn? ĉu katoj manĝas vespertojn?" kaj kelkfoje, "ĉu vespertoj manĝas katojn?" ĉar, pro tio ke ŝi povis respondi nek unu demandon nek la alian, ne multe gravis kia ŝi faris ĝin. Ŝi sentis sin endormiĝi, kaj ĵus komencis sonĝi ke ŝi marŝas man'-en-mane kun Dina, kaj diras al ŝi, tre serioze, "Nu, Dina, kara, diru al mi la veron. Ĉu vi iam manĝis vesperton?" kiam subite, tump! tump! ŝi ektrafis amason da branĉetoj kaj sekaĵeretoj, kaj la falo ĉesis.

Alico tute ne estis vundita, kaj ŝi tuj eksaltis sur siajn piedojn: ŝi supren rigardis, sed estis tute obskure supre; antaŭ ŝi estis alia longa koridoro, kaj la blanka kuniklo estis ankoraŭ videbla, rapide marŝante tra ĝi. Necesis perdi eĉ ne momenton: Alico kuris kiel la vento, kaj estis ĝustatempa por aŭdi ĝin diri, dum ĝi ĉirkaŭiris angulon, "je miaj oreloj kaj vangharoj, kiom malfruiĝas!" Ŝi ĉirkaŭiris la angulon post ĝi, kaj tuj trovis sin en longa malalta halo, kiun lumigis vico de lampoj pendantaj de la tegmento.

Estis pordoj tute ĉirkaŭ la koridoro, sed ĉiuj estis ŝlositaj, kaj kiam Alico laŭiris la

tuton, provante ĉiun, ŝi marŝis malfeliĉe laŭ la centro, demandante al si kiel ŝi do sukcesos reeliri: subite ŝi trovis malgrandan trikruran tablon, tute el solida vitro; estis nenio sur ĝi escepte de eta ora ŝlosilo, kaj la nura penso de Alico estis ke eble ĝi apartenas al unu el la pordoj de la koridoro, sed, ve! aŭ la seruroj estis tro grandaj, aŭ la ŝlosilo estis tro malgranda, sed ĉiu-okaze ĝi ne malfermis iun el ili. Tamen, ĉirkaŭirante la duan fojon, ŝi trovis malaltan kurtenon, kaj malantaŭ ĝi estis malgranda pordo ĉirkaŭ kvardek kvin centimetrojn alta: ŝi provis la malgrandan oran ŝlosilon en la seruro, kaj ŝi trovis ĝin ĝusta! Alico malfermis la pordon kaj rigardis tra koridoreto, ne pli granda ol ratotruo, en la plej belan ĝardenon iam viditan. Kiom ŝi sopiris eliri el tiu obskura koridoro, kaj vagi inter tiuj bedoj de brilantaj floroj kaj tiuj malvarmaj fontoj, sed ŝi ne

povis puŝi eĉ sian kapon tra la pordejon, "kaj eĉ se mia kapo ja trairus," pensis kompatinda Alico, "apenaŭ utilus sen miaj ŝultroj. Ho, kiom mi volonte fermiĝus kiel teleskopo! Mi kredas ke mi povus, se nur mi scipovus komenci." Ĉar, komprenu, tiom da kontraŭkutimaj eventoj okazis lastatempe ke Alico komencis kredi ke vere tre malmulto estas malebla.

Nenio alia estis farebla, do ŝi reiris al la tablo, duone esperante trovi ankoraŭ alian ŝlosilon sur ĝi, aŭ almenaŭ libron de reguloj por fermi homojn kiel teleskopojn: ĉifoje estis malgranda botelo sur ĝi—"kiu certe ne estis tie antaŭe," diris Alico—kaj ligita ĉirkaŭ la kolo de la botelo estis papera etiketo sur kiu la vortoj TRINKU MIN estis bele presitaj per grandaj literoj.

Estis tute bone diri 'trinku min', "sed unue mi rigardos," diris saĝa malgranda Alico, "por vidi ĉu diriĝas 'veneno' sur la botelo," ĉar Alico jam legis plurajn belajn rakontetojn pri infanoj kiuj bruliĝis, kaj kiujn manĝis sovaĝaj bestoj, kaj aliaj malplaĉaj temoj, ĉar ili <u>rifuzis</u> memori la

simplajn regulojn instruitajn al ili de iliaj amikoj, ekzemple, ke se oni eniras fajron ĝi bruligas, kaj ke, se oni tranĉas fingron tre profunde per tranĉilo, kutime ĝi sangas, kaj ŝi neniam forgesis ke, se oni trinkas el botelo signita 'veneno', preskaŭ certe ĝi montriĝos malsaniga, pli aŭ malpli frue.

Tamen tiu botelo ne estis signita 'veneno', do Alico gustumis ĝin, kaj, trovinte ĝin tre plaĉa, (efektive ĝi gustis iom kiel miksaĵo de ĉeriza torto, kustardo, ananaso, rostita meleagraĵo, melasa sukeraĵo, kaj varma buterumita toasto), ŝi tre rapide plenmanĝis ĝin.

* * * * * *

"Kia kurioza sento!" diris Alico, "certe mi fermiĝas kiel teleskopo."

Kaj tiel ja estis: ŝi nun estis nur dudek kvin centimetrojn alta, kaj ŝia vizaĝo lumiĝis pro la perso ke nun ŝi estas ĝuste granda por trairi la malgrandan pordon en tiun belan ĝardenon. Unue, tamen, ŝi atendis kelkan minutojn por trovi ĉu ŝi pli ŝrumpos: ŝi estis iom nervoza pri tio, "ĉar eble," diris Alico al si, "mi fine tute

estingiĝos, kiel kandelo, kaj kia mi estus tiam?" Kaj ŝi penis imagi kia estas la flamo post la estingiĝo de la kandelo, ĉar ŝi ne povis memori ke ŝi iam vidis tian. Tamen, nenio plia okazis, do ŝi decidis tuj eniri la ĝardenon, sed ve, kompatinda Alico! kiam ŝi atingis la pordon, ŝi trovis ke ŝi forgesis la malgrandan oran ŝlosilon, kaj kiam ŝi reiris al la tablo por preni ĝin, ŝi trovis ke ŝi tute ne povas atingi ĝin: ŝi povis tute klare vidi ĝin tra la vitro, kaj ŝi penegis grimpi unu el la kruroj de la tablo, sed ĝi estis tro glitiga, kaj kiam ŝi lacigis sin per penado, la kompatinda uleto sidiĝis kaj ploris.

"Ĉit! ne utilas plori tiel!" diris Alico al si, iom malafable, "mi konsilas ke vi ĉesu plori jam tuj!" (ŝi kutime tre bone konsilis sin, kaj kelkfoje ŝi tiom severe riproĉis sin ke larmoj estiĝis en ŝiaj okuloj, kaj ŝi memoris ke unufoje ŝi batis

siajn proprajn orelojn ĉar ŝi malafable rilatis al si dum kroketa konkurso kontraŭ si mem, ĉar tiu kurioza infano tre amis ludi ke ŝi estas du personoj) "sed ne utilas nun," pensis kompatinda Alico, "ludi ke mi estas du personoj! Ho, aperaŭ restas sufiĉe da mi por konsistigi unu respektindan personon!"

Baldaŭ ŝia okulo ekvidis malgrandan ebonan keston kuŝantan sub la tablo: ŝi malfermis ĝin, kaj trovis en ĝi tre malgrandan kukon, sur kiu kuŝis karto kun la vortoj MANĜU MIN bele surpresitaj per grandaj literoj. "Mi manĝos," diris Alico, "kaj se ĝi pligrandigos min, mi povos atingi la ŝlosilon; kaj se ĝi malpligrandigos min, mi povos rampi sub la pordon, do laŭ ambaŭ manieroj mi povos eniri la ĝardenon, kaj ne gravas al mi kiu el ili okazos!"

Ŝi manĝis iometon, kaj diris maltrankvile al si "kien? kien?" kaj metis manon sur la supron de sia kapo por senti kiudirekten ĝi kreskas, kaj ŝin tre surprizis trovi ke ŝi restas same granda: komprenebletio kutime okazos kiam oni manĝas kukon,

sed Alico jam kutimiĝis atendi nur stangajn eventojn, kaj ŝajnis tre enuige kaj stulte ke la vivo plu okazas laŭkutime.

Do ŝi ekis pli manĝi, kaj tre baldaŭ plenmanĝis la kukon.

* * * * *

"Kurioziĝe kurioziĝa!" kriis Alico, (ŝin tiom surprizis, ke ŝi plene forgesis paroli laŭgramatike,) "nun mi malfermiĝas kiel la plej granda teleskopo iam ekzistinta! Adiaŭ, piedoj!" (ĉar kiam ŝi rigardis siajn piedojn, ili aspektis preskaŭ nevideblaj, ĉar ili fariĝis tiom malproksimaj), "ho, miaj kompatindaj piedetoj. Kiu surmetos viajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn por vi nun, karuloj? Mi certe ne povos! Mi estos multe tro distanca por ĝeni min pri vi: vi devos prizorgi vin mem laŭeble—sed mi nepre estu afabla al ili," pensis Alico, "ĉar eble ili rifuzos marŝi kien mi volas! Mi pensu: mi donos al ili novan paron da botoj ĉiun Kristnaskon."

Kaj ŝi plu planis kiel ŝi faros tion: "mi devos sendi ilin per la kuriero," ŝi pensis, "kaj kiom strange ŝajnos, sendi donacojn al la propraj piedoj! Kaj kiom stranga aspektos la adreso!

AL S-RO DEKSTRA PIEDO DE ALICO,
LA TAPIŜO,
kun AMO, DE ALICO

ho ve! kiajn absurdaĵojn mi diras!"

Ĝuste tiumomente ŝia kapo frapis la tegmenton de la halo: efektive ŝi nun estis iom pli ol tri metrojn alta, kaj ŝi tuj prenis la malgrandan oran ŝlosilon kaj rapidis al la pordo de la ĝardeno.

Kompatinda Alico! ŝi nur malfacile sukcesis kuŝiĝi sur unu flanko kaj rigardi en la ĝardenon per unu okulo, sed trairi, nu tio estis eĉ pli senespera celo ol antaŭe: ŝi sidiĝis kaj denove ploris.

"Hontu!" diris Alico, "granda knabino kia vi," (ŝi certe pravis dirante tion!) "ploranta tiel! Ĉesu jam nun, mi diras al vi!" Sed ŝi plu ploradis malgraŭe, plorante litrojn da larmoj, ĝis estis granda lago ĉirkaŭ ŝi, proksimume dek centimetrojn profunda kaj etendiĝanta trans duono de la halo. Post kelka tempo, ŝi aŭdis nelaŭtan paŝadon de piedoj iom

distancaj, kaj rapide sekigis siajn okulojn por vidi kio venas. Estis la blanka kuniklo revenanta, elegante vestita, kun paro da blankaj kapridhaŭtaj gantoj en unu mano kaj bukedo en la alia. Alico sentis sin tiom senespera ke ŝi estis preta peti helpon de iu ajn, kaj dum la kuniklo pasis ŝin, ŝi diris per nelaŭta, timeta voĉo, "Bonvolu, sinjoro—" La kuniklo ektremegis, suprenrigardis la tegmenton de la halo, el kie ŝajne venis la voĉo, faligis la bukedon kaj la blankajn kapridhaŭtajn gantojn, kaj forkuris en la obskuron kiel eble plej rapide.

Alico prenis la bukedon kaj la gantojn, kaj trovis la bukedon tiel belodora ke ŝi pluflaradis ĝin dum ŝi parolis al si— "ve, ve! kiom stranga estas ĉio hodiaŭ! kaj hieraŭ ĉio estis tute kutima: ĉu eble mi ŝanĝiĝis dum la nokto? Mi pensu: ĉu mi mem estis la sama persono kiam mi ellitiĝis

ĉimatene? Mi kredas memori ke mi sentis min iomete diferenca. Se mi ne estas la sama, la demando estas: kiu en la mondo mi estas? Ha, jen la granda enigmo!" Kaj ŝi komencis pensi pri ĉiuj infanoj kiujn ŝi konas kiuj estas samaĝaj kiel ŝi, por trovi ĉu eble ŝi ŝanĝiĝis en iun el ili.

"Mi certas ke mi ne estas Gertrude," ŝi diris, "ĉar ŝia havaro estas tre bukla, kaj mia tute ne havas buklojn—kaj mi certas ke mi ne povas esti Florence, ĉar mi scias ĉiajn aferojn, kaj ŝi, ho! ŝi scias vere malmulton! Krome, ŝi estas ŝi, kaj mi estas mi, kaj—ho ve! kiom enigme estas! Mi provu memori ĉu mi scias ĉion kion mi antaŭe sciis. Mi pensu: kvaroble kvin estas dek du, kaj kvaroble ses estas dek tri, kaj kvaroble sep estas dek kvar—ve! mi neniam atingos dudek tiel! Tamen, la Obla Tabelo ne gravas—ni provu Geografion. Londono estas la ĉefurbo de Francio, kaj Romo estas la ĉefurbo de Jorkŝiro, kaj Parizo—ho ve! ve! tio estas tute erara, mi certas! Evidente mi ŝanĝiĝis en Florencen! Mi provu diri 'Ĉar jen la

laborema',” kaj ŝi krucis siajn manojn sur siaj genuoj, kaj komencis, sed ŝia voĉo sonis raŭka kaj stranga, kaj la vortoj ne estis samaj kiel antaŭe:

“Ĉar jen la eta krokodil'
Beligas sian voston,
Kaj versas akvon de la Nil'
Sur ĉiun oran oston!

Feliĉe sonas lia rid'
Por kaŝi lian celon,
Kaj fiŝoj do kun plena fid'
Transnaĝas la makzelon!”

“Mi estas certa ke tiuj vortoj ne estas ĝustaj,” diris kompatinda Alico, kaj ŝiaj okuloj pleniĝis per larmoj dum ŝi pensis “nepre mi ja estas Florence, kaj mi devos loĝi en tiu aĉa dometo, kaj ludi per preskaŭ neniuj ludiloj, kaj lerni, ho! tiom da lecionoj! Ne! Mi firme decidis: se mi estas Florence, mi restos ĉi tie! Ne utilos al ili subŝpuŝi siajn kapojn kaj diri 'venu supren, kara!' Mi nur suprenrigardos kaj

diros, 'do kiu mi estas? unue diru al mi tion, kaj poste, se al mi plaĉas esti tiu persono, mi supreniros: se ne, mi restos ĉi tie ĝis mi fariĝos iu alia' — sed ve!" kriis Alico ekplorante, "mi volegas ke ili ja subŝpuŝu siajn kapojn! Min plene tedas esti tute sola ĉi tie!"

Dirante tion, ŝi rigardis siajn manojn, kaj ŝin surprizis vidi ke ŝi surmetis unu el la malgrandaj gantoj de la kuniklo dum ŝi parolis. "Kiel mi povis fari tion?" pensis ŝi; "sendube mi remalgrandiĝas." Ŝi surpiediĝis kaj iris al la tablo por mezuri sin per ĝi, kaj trovis ke, laŭ sia plej bona takso, ŝi nun estas proksimume sesdek centimetrojn alta, kaj plu ŝrumpas rapide. Ŝi baldaŭ trovis ke la kaŭzo de tio estas la bukedo kiun ŝi tenas en la mano: ŝi haste faligis ĝin, nur sufiĉatempe por eviti plenan forŝrumpon, kaj trovis ke ŝi nun estas nur ok centimetrojn alta.

"Nun al la ĝardeno!" kriis Alico, dum ŝi rekuris rapide al la malgranda pordo, sed la malgranda pordo denove estis ŝlosita,

kaj la malgranda ora ŝlosilo kuŝis denove sur la vitra tablo, "kaj nun estas eĉ pli malbone ol antaŭe!" pensis la kompatinda knabineto, "ĉar neniam mi estis tiom malgranda, neniam! Kaj mi diras ke estas domaĝe, tion mi diras!" Tiumomente ŝia piedo glitis, kaj plaŝ! salakvo kovris ŝin ĝis ŝia mentono. Ŝia unua penso estis ke ŝi falis en la maron: poste ŝi memoris ke ŝi estas sub la tero, kaj ŝi baldaŭ komprenis ke temas pri la lago de larmoj kiujn ŝi ploris dum ŝi estis tri metrojn alta. "Ho, ke mi ne estus tiom plorinta!" diris Alico, dum ŝi ĉirkaŭnaĝis, penante trovi elirejon; "nun mi punigas, mi supozas, per drono en miaj propraj larmoj! Nu! tio ja estos strangaĵo, tute

certe! Tamen, ĉio estas stranga hodiaŭ." Ĝuste tiam ŝi vidis ion plaŭdantan en la lago proksime al ŝi: unue ŝi pensis ke sendube ĝi estas rosmaro aŭ hipopotamo, sed baldaŭ si memoris kiom malgranda ŝi mem estas, kaj baldaŭ ŝi povis vidi ke ĝi estas nur muso, kiu englitis same kiel ŝi.

"Ĉu iel utilus," pensis Alico, "paroli al tiu muso? La kuniklo estas io tre malkutima, sendube, kaj tia estas mi ekde kiam mi subiris ĉi tien, sed tio ne signifas ke la muso ne povas paroli. Mi kredas ke estas dezirinde provi."

Do ŝi komencis: "ho Muso, ĉu vi scias kiel eliri el ĉi tiu lago? Min tre lacigas naĝado ĉi tie, ho Muso!" La muso rigardis ŝin iom dubeme, kaj ŝajnis al ŝi ke ĝi palpebrumis per unu el siaj okuletoj, sed ĝi diris nenion.

"Eble ĝi ne komprenas," pensis Alico; "versâjne ĝi estas Franca muso, veninta kun Vilhelmo la Konkerinto!"[1] (ĉar, malgraŭ sia scio pri historio, Alico tute ne klare konceptis antaŭ kiom da jaroj io okazis), do ŝi rekomencis: "où

[1] Franca reĝo kiu konkeris Brition en la jaro 1066 p.K.

est ma chatte?"[2] tio estis la unua frazo en ŝia lernolibro de la Franca lingvo. La muso eksaltis en la akvo, kaj ŝajnis timtremi: "ho, mi petas pardonon!" kriis Alico tuj, timante ke ŝi vundis la sentojn de la kompatinda besto. "Mi tute forgesis ke vi ne amas katojn!"

"Ne amas katojn!" kriis la muso, per akra, pasia voĉo. "Ĉu vi amus katojn se vi estus mi?"

"Nu, eble ne," diris Alico per trankviliga tono; "ne koleru. Sed mi vere deziras povi montri al vi nian katon Dina: mi kredas ke vi amus katojn se vi povus vidi ŝin. Ŝi estas tre kara, kvieta besto," Alico diris, duone al si, dum ŝi naĝis leĝere en la lago, "ŝi sidas ronronante tre bele apud la kameno, lekante siajn piedojn kaj lavante sian vizaĝon: kaj estas tre plezure karesi ŝin, kaj ŝi bonege kaptas musojn—ho! bonvolu pardoni!" kriis kompatinda Alico denove, ĉar ĉifoje la muso tremegis, kaj ŝi sentis ke nepre

[2] "Kie estas mia kato?"

ŝi ofendis ĝin. "Ĉu mi ofendis vin?"

"Ofendis, ĉu vi bezonas demandi!" kriis la muso, kiu tremis tutkorpe pro furiozo; "nia familio de ĉiam malamas katojn! Fiaj, aĉaj, maldecaj bestoj! Ne plu parolu al me pri ili!"

"Tute ne!" diris Alico, rapidante ŝanĝi la temon de la konversacio. "Ĉu vi—ĉu vi—amas—hundojn?" La muso ne respondis, do Alico plu parolis fervore: "estas vere kara hundeto proksime al nia domo, mi volonte montrus al vi! Malgranda helokula terhundo, sciu, kun ho! tre longaj buklaj brunaj haroj! Kaj ĝi reportas aĵojn kiujn oni ĵetas, kaj ĝi sidiĝas kaj petas sian manĝon, kaj faras ĉiajn aferojn—mi eĉ ne povas memori multajn el ili—kaj ĝi apartenas al kultivisto, kaj li diras ke ĝi mortigas ĉiujn ratojn kaj—ho, ve!" diris Alico malĝoje, "mi kredas ke denove mi ofendis ĝin!" ĉar la muso fornaĝadis de ŝi kiel eble plej forte, kaj faris grandan brukonfuzon en la lago dum ĝi naĝis.

Do ŝi vokis al ĝi moltone: "muso kara! Bonvolu reveni, kaj ni ne plu diskutos katojn, nek hundojn, se vi ne amas ilin!" Aŭdinte tion, la muso turnis sin kaj malrapide renaĝis al ŝi: ĝia vizaĝo estis tute pala (pro pasio, Alico pensis), kaj ĝi diris, per nelaŭta, trema voĉo, "ni iru al la bordo, kaj tie mi rakontos al vi mian historion, kaj vi komprenos kial mi malamas katojn kaj hundojn."

Ili ja ĝustatempe foriris, ĉar la lago fariĝis tre plena de birdoj kaj bestoj falintaj en ĝin: estis Anaso kaj Dido, Lorio kaj Agleto, kaj pluraj aliaj kuriozaj bestoj. Alico gvidis, kaj la tuta grupo naĝis al la bordo.



Ĉapitro 11



La grupo kiu kuniĝis sur la bordo vere estis kuriozaspekta—la birdoj kun kot-kovritaj plumoj, la bestoj kies felo premiĝis plate sur la haŭto—kaj ĉiuj gutis pro malsekeco, kaj estis malafablaj, kaj malkomfortaj. La unua tasko, kompreneble, estis kiel resekiĝi: ili interparolis pri tio, kaj tute ne surprizate Alico trovis sin familiare konversacianta kun la birdoj, kvazaŭ koninte ilin dum sia tuta vivo. Efektive, ŝi tre longe kverelis kun la Lorio, kiu fine komencis paŭti, kaj diris nur "mi estas pli aĝa ol vi, do nepre plej bone scias," kaj tion Alico rifuzis akcepti sen scii kiom aĝa estas la Lorio, kaj ĉar la Lorio persiste rifuzis informi pri sia aĝo, nenio pli estis direbla.

Fine la muso, kiu ŝajnis havi iom da aŭtoritato inter ili, vokis "sidiĝu, ĉiuj, kaj atentu min! Mi baldaŭ sufiĉe sekigos vin!" Ĉiuj tuj sidiĝis, tremante pro malvarmo, en granda cirklo, kun Alico en la centro kun siaj okuloj maltrankvile fiksitaj al la muso, ĉar ŝi estis certa ke ŝi baldaŭ severe malvarmumos se ŝi ne sekiĝos tre baldaŭ.

"Ahem!" diris la muso, aplombe, "ĉu ĉiuj estas pretaj? Jen la plej seka sekaĵo kiun mi konas. Silentu ĉiuj, bonvole!

"'Vilhelmo la Konkerinto, kies celon favoris la papo, baldaŭ trovis subtenon de la Angloj, kiuj volis gvidistojn, kaj kiuj lastatempe multe kutimiĝis al uzurpado kaj konkerado. Edvino kaj Morkaro, la grafoj de Mercio kaj Nortumbrio—'"

"Uf!" diris la Lorio, tremante pro malvarmo.

"Pardonu?" diris la muso, sulkante la frunton sed tre ĝentile, "ĉu vi parolis?"

"Ne mi!" diris la Lorio rapide.

"Mi kredis ke jes," diris la muso, "mi daŭrigas. 'Edvino kaj Morkaro, la grafoj de Mercio kaj Nortumbrio, deklaris sin por li; kaj

eĉ Stigando, la patriota ĉefepiskopo de Kanterburio, trovis konsilinde akompani Edgaron Atelingon por renkonti Vilhelmon kaj proponi al li la kronon. La konduto de Vilhelmo unue estis modera—' kiel estas nun, kara?" diris la muso, turnante sin al Alico dum ĝi parolis.

"Ankoraŭ plene malseka," diris kompatinda Alico, "ŝajne tute ne sekigas min."

"Tiuokaze," diris la Dido solene, surpiediĝante, "mi proponas ke la kunveno prokrastiĝu, por la tuja adopto de pli energiaj rimedoj—"

"Parolu klare!" diris la Anaso, "mi ne komprenas kion signifas duono de tiuj grandaj vortoj, kaj krome, mi ne kredas ke vi mem komprenas ilin!" Kaj la Anaso kvakis komfortan kaŝitan ridon. Kelkaj el la aliaj birdoj pepis aŭdeble.

"Mi nur intencis diri," diris la Dido per ofendita tono, "ke mi konas domon proksiman al ĉi tie, kie ni povus sekigi la junulinon kaj la ceterajn grupanojn, kaj post tio ni povus komforte aŭskulti la rakonton kiun, mi kredas, vi bonvolis promesi rakonti al ni," klinante sin solene antaŭ la muso.

La muso ne oponis tion, kaj la tuta grupo movis sin laŭlonge de la riverbordo, (ĉar la lageto jam komencis elflui el la koridoro, kaj ĝian randon franĝis junkoj kaj neforgesuminoj), farante malrapidan procesion, la Dido gvidis. Post kelka tempo la Dido senpacienciĝis, kaj lasinte la Anason gvidi la ceterajn grupanojn, ĝi movis sin pli rapide kun Alico, la Lorio, kaj la Aglido, kaj baldaŭ ili atingis malgrandan domon, kaj tie ili sidis komforte apud la fajro, vindinte sin per lantukoj, ĝis la aliaj grupanoj alvenis, kaj ili ĉiuj denove estis sekaj.

Post tio ili ĉiuj residiĝis en granda cirklo sur la bordo, kaj petis la muson komenci sian rakonton.

"Mia estas longa kaj malfeliĉa!" diris la muso, turnante sin al Alico, kaj ĝemante.

"Longa, certe," diris Alico, rigardante la voston de la muso miroplene; ĝi estis volvita ĉirkaŭ la tuta grupo—"sed kial vi nomas ĝin malfeliĉa?" Kaj ŝi plu cerbumis pri tio dum la muso parolis, tiel ke ŝia koncepto pri la rakonto estis ĉi tia:

Vi loĝis sub la mato
Komforte kiel rato
Sed pro la nigra fato
Ankaŭ estis kato!
Kaj estis
kromabundo
Malĝoja ĉe
l' korfundo,
Eĉ dum ĉiu lundo:
Ja estis ankaŭ hundo!
Nu, dum
la kat'
forestas,
La musoj
ĝoje
festas,
Sed, he!
(Merkrede, laŭkrede)
Venis hund' kaj
kat', Serĉe
al la
rat',
Musfrapis
vigla bat'
Estiĝis
musa
glat'
Sube
la
mat'. Komforte
kiel
rat'.
Kaj
vere estis
kat'!

"Vi ne atentas!" diris la muso al Alico severe, "pri kio vi pensas?"

"Bonvolu pardoni," diris Alico tre humile, "vi atingis la kvinan kurbiĝon, mi kredas?"

"Vi ne aŭskultas mian odon!" kriis la muso, akre kaj tre kolere.

"Nodon!" diris Alico, fervora esti utila, kaj ĉirkaŭrigardante malkviete, "ho, lasu min helpi malligi ĝin!"

"Mi faros tute nenion tian," diris la muso, leviĝante kaj formaŝante de la grupo, "vi insultas min, parolante tiajn absurdajojn!"

"Mi ne intencis insulti!" pledis kompatinda Alico, "sed vi ege facile ofendiĝas, sciu."

La muso nur grumblis responde.

"Bonvolu reveni kaj fini vian rakonton!" Alico vokis, kaj la aliaj ĉiuj diris ĥore "jes, bonvolu!" sed la muso nur rifuze skuis siajn orelojn, kaj formarŝis rapide, kaj baldaŭ ĝi ne plu estis videbla.

"Ja domaĝe ke ĝi rifuzis resti!" ĝemis la Lorio, kaj maljuna Krabo uzis la

oportunon por diri al sia filino, "ha, kara! Tio instruu al vi ke vi neniam koleriĝu!" "Ĉit, Panjo!" diris la juna Krabo, iom mordeme, "vi eĉ eltrivus la pacienc̆on de ostro!"

"Mi volontege havus Dinan ĉi tie, mi scias tion!" diris Alico pervoĉe, parolante al neniu specifa, "ŝi baldaŭ reportus ĝin!"

"Kaj kiu estas Dina, se me rajtas demandi tion?" diris la Lorio.

Alico respondis volonte, ĉar ŝi estis ĉiam preta paroli pri sia amata besto, "Dina estas nia kato. Kaj ŝi estas lertega pri kaptado de musoj, vi ne povas imagi tion! Kaj ho, se vi nur povus vidi ŝin ĉasi la birdojn! Nu, ŝi manĝas birdeton apenaŭ vidinte ĝin!"

Tiu parolo kaŭzis rimarkindan sensacion en la grupo: kelkaj birdoj forrapidis tuj; unu maljuna pigo komencis surmeti mantelon tre zorge, komentante, "mi vere devas iri hejmen: la noktaero damaĝas mian gorĝon," kaj kanario vokis per tremanta voĉo al siaj infanoj, "forvenu de ŝi, karuloj, ŝi ne estas taŭga kompano por vi!" Diverspretekste, ili ĉiuj foriris, kaj Alico baldaŭ restis sola.

Ŝi sidis kelkatempe, malĝoje kaj silente, sed post nelonge ŝi denove estis bonspirita, kaj ŝi rekomencis paroli al si kiel kutime: "se nur kelkaj el ili estus restintaj iom pli longe! kaj mi komencis esti tre amikema kun kelkaj el ili—vere la Lorio kaj mi estis preskaŭ fratinoj! kaj ankaŭ tiu kara Agleto! Kaj la Anaso kaj la Dido! Kiel bele la Anaso kantis al ni dum ni venis tra la akvo: kaj se la Dido ne estus koninta la vojon al tiu kara dometo, mi tute ne scias kiam ni resekigus nin—" kaj ne eblas sci kiom longe ŝi babiladus al si tiel, se ŝi ne subite ekaŭdus la sonon de paŝantaj piedoj.

Venis la blanka kuniklo, malrapide trotante, kaj rigardante malkviete dum ĝi iris, kvazaŭ perdinte ion; kaj ŝi aŭdis ĝin murmuradi al si, "la Markizino! la Markizino! ho miaj karaj piedoj! ho miaj felo kaj lipharoj! Ŝi ekzekutigos min, tiel certe kiel musteloj estas musteloj! Kie do mi faligis ilin, <u>kie</u>?" Alico preskaŭ tuj divenis ke ĝi serĉas la bukedon kaj la paron da blankaj kapridhaŭtaj gantoj, kaj

ŝi komencis serĉi ilin, sed ili nenie estis videblaj—ŝajne ĉio ŝanĝiĝis post ŝia naĝo en la lago, kaj ŝia marŝado laŭlonge de la riverbordo kun ĝia franĝo el junkoj kaj neforgesuminoj, kaj la vitra tablo kaj la pordeto estis malaperintaj.

Baldaŭ la kuniklo rimarkis Alicon, dum ŝi staris senkomprene ĉirkaŭrigardante, kaj tuj diris per rapida kolera tono, "nu, Mari-Ann! kion vi faras ĉi tie? Kuru hejmen jam nun, kaj serĉu sur mia tualetotablo miajn gantojn, kaj bukedon kaj alportu ilin, laŭeble plej rapide, ĉu vi aŭdas?" kaj Alico tiom timis ke ŝi tuj

forkuris sen diri eĉ vorton, laŭ la direkto kiun la kuniklo indikis.

Ŝi baldaŭ trovis sin antaŭ belaspekta dometo, sur kies pordo estis brila latuna ŝildo kun la nomo B. KUNIKLO. Ŝi eniris, kaj rapidis al la supra etaĝo, plena de timo ke ŝi renkontos la realan Mari-Anron kaj forsendiĝos el la domo antaŭ ol trovi la gantojn: ŝi sciis ke unu paro estis perdita en la koridoro, "sed kompreneble," pensis Alico, "ĝi havas multajn aliajn en sia domo. Estas tre strange plenumi taskojn por kuniklo! Mi supozas ke Dina donos al mi taskojn baldaŭ!" Kaj ŝi komencis imagi kiaj eventoj okazus: "'Fraŭlino Alico! Venu ĉi tien tuj kaj pretiĝu por via promeno!' 'Mi venos post minuto, Vartistino! sed mi devas gardi ĉi tiun mustruon ĝis revenos Dina, kaj certigi ke la muso ne eskapos—' sed mi kredas," Alico pludiris, "ke ili ne permesus ke Dina restu en la domo se ĝi komencus ordoni al homoj tiel!"

Ŝi jam trovis plaĉan malgrandan ĉambron, en kiu estis tablo ĉe la fenestro

sur kiu estis spegulo kaj, (konforme al la espero de Alico), estis du aŭ tri paroj da malgrandaj blankaj kapridhaŭtaj gantoj: ŝi prenis paron da gantoj, kaj estis tuj eliranta el la ĉambro, kiam ŝia vido trafis malgrandan botelon starantan apud la spegulo: neniu etiketo surestis ĉifoje kun la vortoj 'trinku min', tamen ŝi eltiris la korkon kaj metis ĝin al siaj lipoj: "mi scias ke io interesa nepre okazas," ŝi diris al si, "kiam ajn mi manĝas aŭ trinkas, do mi trovos kion faros ĉi botelo. Mi tre esperas ke ĝi rekreskigos min, ĉar vere mi tre enuas estante tiom eta malgrandulo!"

Tio ja okazis, kaj multe pli frue ol ŝi atendis: antaŭ ol ŝi trinkis duonon de la botelo, ŝi trovis sian kapon premanta la plafonon, kaj ŝi klinis sin por ke ŝia kolo

ne rompiĝu, kaj rapide formetis la botelon, dirante al si "tio tute sufiĉas — mi esperas ne plu kreski — ke mi ne estu trinkinta tiom!"

Ve! Estis tro malfrue: ŝi plu kreskis kaj kreskadis, kaj tre baldaŭ ŝi devis surgenuiĝi sur la planko: post plia minuto la spaco eĉ ne sufiĉis por tio, kaj ŝi provis la efikon de kuŝado kun unu kubuto kontraŭ la pordo, kaj la alia brako kurbigita sub ŝia kapo. Tamen ŝi ankoraŭ kreskadis, kaj kiel lastan eblon ŝi metis unu brakon tra la fenestron kaj unu piedon en la kamentubon kaj diris al si, "nun mi nenion pli povas — <u>kio</u> okazos al mi?"

Bonfortune por Alico, la malgranda magia botelo nun plene efikis, kaj ŝi ne pli kreskis: tamen estis tre malkomforte, kaj, ĉar ŝajne neniam estos oportuno por ke ŝi denove eliru la ĉambron, ne mirigas ke ŝi estis malfeliĉa. "Estis multe pli agrable ĉehejme," pensis kompatinda Alico, "kie oni ne ĉiam pligrandiĝis kaj ŝrumpis, kaj ricevadis ordonojn de musoj kaj kunikloj—mi preskaŭ preferus ne esti enirinta tiun kuniklo-truon, kaj tamen, kaj tamen—ĉi tia vivo estas iom kurioza, sciu. Mi vere ne komprenas kio okazas al mi! Kiam mi legadis ferakontojn, mi supozis ke tiaj aferoj neniam okazas, kaj nun jen mi en la mezo de ferakonto! Oni devus verki libron pri mi, jes oni devus! kaj kiam mi plenkreskos, mi verkos ĝin—sed mi jam plene kreskis," ŝi pludiris mornavoĉe, "almenaŭ ne estas spaco por pli plene kreski ĉi tie."

"Sed," pensis Alico, "ĉu mi neniam fariĝos pli aĝa ol nun? Tio komfortigos,

unumaniere — neniam fariĝi olda virino — sed — ĉiam devi lerni lecionojn! Ho, mi ne ŝatus tion!"

"Ho, malsaĝa Alico!" ŝi diris denove, "kiel vi povus lerni lecionojn ĉi tie? Nu, estas apenaŭ spaco por vi, kaj tute nenia spaco por lernolibroj!"

Kaj tiel ŝi daŭrigis, unue rolante kiel unu persono, kaj poste kiel alia, kaj farante enfine grandan konversacion, sed post pluraj minutoj ŝi aŭdis voĉon eleksteran, kio instigis ŝin aŭskulti.

"Mari-Ann! Mari-Ann!" diris la voĉo, "alportu miajn gantojn jam nun!" Sekvis nelaŭta paŝado sur la ŝtupoj: Alico sciis ke la kuniklo venas serĉi ŝin, kaj ŝi tremis ĝis ŝi tremigis la domon, tute forgesante ke ŝi estas eble miloble pli granda ol la kuniklo, kaj tute ne bezonas timi ĝin. Baldaŭ la kuniklo venis al la pordo, kaj klopodis malfermi ĝin; sed, ĉar la pordo devis malfermiĝi enen, kaj la kubuto de Alico forte premis ĝin, tiu klopodo fiaskis. Alico

aŭdis ĝin diri al si, "do mi ĉirkaŭiros kaj eniros per la fenestro."

"Tion vi ne faros!" pensis Alico, kaj, atendinte ĝis ŝi kredis aŭdi la kuniklon tuj sub la fenestro, ŝi ekdisetendis siajn

fingrojn kaj faris kaptogeston en la aero. Ŝi nenion kaptis, sed ŝi aŭdis krieton kaj falon kaj rompiĝon de vitro, kaj konkludis ke eblete ĝi falis en kukumforcejon aŭ ion similan.

Sekvis kolera voĉo—de la kuniklo—"Patriĉjo, Patriĉjo! Kie vi estas?" Kaj post tio voĉon kiun ŝi antaŭe ne aŭdis, "certe jen mi estas! Elfosante pomojn, via moŝto!"

"Elfosante pomojn, ĉu?" diris la kuniklo kolere, "ĉi tien! Venu helpi min el

ĉi tio!"—Pliaj sonoj de rompiĝanta vitro.

"Nu diru al mi Patriĉjo, kio estas tio venanta tra la fenestro?"

"Certe, ĝi estas brako via moŝto!" (Li prononcis ĝin "barako".)

"Brako, ansero! Kiu vidis brakon tiom grandan? Nu, ĝi plenigas la tutan fenestron, ĉu vi ne vidas?"

"Certe ja, via moŝto, tamen brako malgraŭe."

"Nu, ĝi ne rajtas esti tie: forprenu ĝin!"

Tion sekvis longa silento, kaj Alico aŭdis nur sporadajn flustrojn, kiaj "certe, al mi ne plaĉas, via moŝto, tute ne, neniel!" "faru kion mi ordonas, timulo!" kaj fine ŝi denove disetendis siajn fingrojn kaj rekaptegestis en la aero. Ĉifoje aŭdiĝis du krietoj, kaj pli sonis rompiĝanta vitro. "Kiom da kukumforcejoj estas!" pensis Alico. "Kion ili faros poste? Kaj tiri min el la fenestro, nu mi volegas ke ili ja povu. Certe mi ne volas resti ĉi tie pli longe!"

Ŝi atendis dum kelka tempo sen aŭdi

ĵon pli: fine venis bruo de malgrandaj ĉarumradoj, kaj la sono de multaj voĉoj samtempe parolantaj: ŝi deĉifris la vortojn "kie 'stas l' alia ŝtupetaro? — nu, mi ne devis alporti krom unu, Vilĉjo havas l' alian — jen, starigu ilin ĉe tiu angulo — ne, unue kunligu ilin — ili ankoraŭ ne estas sufiĉe altaj — ho, ili sufiĉos. Ne tro postulu — jen, Vilĉjo! Kaptu ĉi tiun ŝnuron — ĉu la tegmento toleros? — antentu, nefiksita ardezo — ho, ĝi falas! Fortiru la kapojn! —" (laŭta bruo) "nu, kiu faris tion? — Vilĉjo, mi kredas — kiu subiru tra la kameno? — ne, mi ne! vi subiru! — tion mi ja ne faros — Vilĉjo subiru — jen, Vilĉjo! la mastro diras ke vi subiru en la kameno!"

"Ho, do Vilĉjo devas subiri en la kameno, ĉu?" diris Alico al si, "nu, ŝajnas ke ili donas ĉiujn taskojn al Vilĉjo! Nepre mi ne volonte estus en la pozicio de Vilĉjo: la kameno estas mallarĝa, certe, sed mi kredas povi iomete piedbati!"

Ŝi retiris sian piedon laŭeble plej, kaj atendis ĝis ŝi aŭdis malgrandan beston

(ŝi ne povis diveni kiaspeca ĝi estas) grati kaj moviĝi en la kameno ne multe super ŝi: tiam, dirante al si "tiu estas Vilĉjo," ŝi faris unu akran piedbaton, kaj denove atendis por vidi kio sekve okazos.



Unue ŝi aŭdis ĝeneralan ĥoron de "tien iras Vilĉjo!" kaj poste nur la voĉon de la kuniklo—"kaptu lin, vi apud la heĝo!" sekvis silento, kaj post tio nova konfuza bruo de voĉoj, "kiel estis, oldulo? kio okazis al vi? diru al ni ĉion."

Lasta estis malgranda febla grinca voĉo, ("de Vilĉjo," pensis Alico), kiu diris, "nu, mi apenaŭ scias—mi estas tute konfuzita—io venas al mi kiel saltpupo kaj supren mi iras kvazaŭ raketo!" "Tion vi faris, oldulo!" diris la aliaj voĉoj.

"Ni bruligu la domon!" diris la voĉo de la kuniklo, kaj Alico kriis kiel eble plej laŭte, "se vi faros tion, mi sendos Dinan kontraŭ vin!" Tuj okazis plena silento, kaj dum Alico pensis "sed kiel mi povas venigi Dinan ĉi tien?" ŝi ĝojege trovis ke ŝi malgrandiĝas: tre baldaŭ ŝi povis lasi sian nekomfortan pozicion en kiu ŝi estis kuŝinta, kaj post du aŭ tri pliaj minutoj ŝi denove estis ok centimetrojn alta.

Ŝi kuris el la domo kiel eble plej rapide, kaj trovis tutan aron da bestetoj atendantaj ekstere—kobajoj, blankaj musoj, sciuroj, kaj "Vilĉjo" malgranda verda lacerto, apogata de la brakoj de unu kobajo, dum alia trinkigis ĝin per io el botelo. Ili ĉiuj ekkuris cele ŝin tuj kiam ŝi aperis, sed Alico forkuris laŭeble plej forte, kaj baldaŭ trovis sin en densa arbaro.

Ĉapitro III

"Vnue," diris Alico al si, dum ŝi vagadis en la arbaro, "necesas rekreski al mia ĝusta grandeco, kaj due mi sukcesu eniri tiun belan ĝardenon. Mi opinias ke tiu estas la plej bona plano."

Ĝi sonis tre bona plano, sendube, kaj tre bele kaj simple aranĝota: la sola problemo estis ke ŝi tute ne sciis kiel plenumi ĝin, kaj dum ŝi rigardis malcerte inter la arboj ĉirkaŭaj, akra bojeto tuj super ŝia kapo devigis ŝin suprenrigardi rapide.

Enorma hundido rigardadis ŝin per grandaj rondaj okuloj, kaj feble etendis

piedon, klopodante tuŝi ŝin: "kompatinduleto!" diris Alico kaĵoltone, kaj ŝi strebis fajfi al ĝi, sed ŝi multe timis pro la perso ke eble ĝi estas malsata, kaj se tiel do ĝi verŝajne plenmanĝos ŝin malgraŭ ŝia kaĵolado. Apenaŭ sciante kion ŝi faras, ŝi prenis tre etan bastonon, kaj tenis ĝin antaŭ la hundido: sekve la hundido eksaltis en la aeron kun ĉiuj piedoj samtempe, bojetante feliĉe, kaj kuris cele la bastoneton ludante ataki ĝin: tuj Alico kuris malantaŭ grandan kardon por ke la hundo ne surtretu ŝin, kaj tuj kiam ŝi aperis aliflanke, la hundido denove kuris cele la bastoneton, kaj falis kapsuben pro sia fervoro kapti ĝin: tiam Alico, kredante ke estas simile al ludado kun ĉarĉevalo, kaj atendante ĉiumomente esti surtretata, denove kuris ĉirkaŭ la kardon: tiam la hundido komencis serion de malgrandaj kuroj cele la bastoneton, kurante comete antaŭen ĉiufoje kaj multe malantaŭen, kaj bojante raŭke tutdume, ĝis fine ĝi sidiĝis tre for, anhelante, kun sia langa pendanta el la buŝo kaj siaj grandaj okuloj duone fermitaj.

Ŝajnis al Alico esti bona oportuno eskapi: do ŝi tuj komencis, kaj ŝi kuris ĝis la bojado de la hundido sonis tre fadinta pro la distanco, kaj ĝis ŝi estis tute laca kaj senspira.

"Tamen ĝi estis tre kara hundido!" diris Alico, dum ŝi apogis sin per ranunkolo por iomete ripozi, kaj ventumis sin per sia ĉapelo, "mi ŝatus instrui al ĝi ludojn, se — se mi nur estus ĝuste granda por tio! Ve! Mi preskaŭ forgesis ke mi devos rekreski! Mi pensu: kiel fari tion? Mi supozas ke mi devus manĝi aŭ trinki ion, sed la granda demando estas, kion?"

La granda demando certe estis, kion? Alico ĉirkaŭrigardis la florojn kaj la herbofolicojn, sed ŝi vidis nenion kio aspektas ĝusta manĝaĵo por la situacio. Estis granda agariko proksime al ŝi, preskaŭ same alta kiel ŝi, kaj rigardinte sub ĝi, kaj ambaŭflanke de ĝi, kaj malantaŭ ĝi, ŝi ekpensis ke estos bone serĉi por trovi kio estas sur ĝi.

Ŝi etendis sin staranta piedpinte, kaj rigardis trans la randon de la agariko, kaj ŝiaj

okulojn tuj renkontis tiujn de granda blua raŭpo, kiu sidis kun siaj brakoj kruccitaj, trankvile fumante longan nargileon, kaj tute ne atentante ŝin nek ion alian.

Dum iom da tempo ili rigardis unu la alian silente: fine la raŭpo prenis la nargileon el sia buŝo, kaj malvigle parolis al ŝi.

"Kiu estas vi?" diris la raŭpo.

Tio ne estis kuraĝiga komenco por konversacio: Alico respondis iom timide, "Mi — mi apenaŭ scias, sinjoro, ĝuste nun — almenaŭ mi scias kiu me est<u>is</u> kiam mi ellitiĝis hodiaŭ matene, sed mi kredas ke mi ŝanĝiĝis plurfoje post tiam."

"Kion signifas tio?" diris la raŭpo, "komprenigu vin!"

"Mi ne povas komprenigi min, sinjoro," diris Alico, "ĉar mi ne estas mi, komprenu."

"Mi ne komprenas," diris la raŭpo.

"Nu, mi ne povas pli klare esprimi," Alico respondis tre ĝentile, "ĉar mi ne povas mem kompreni, kaj estas tre konfuze ŝanĝi grandecon tiom ofte dum unu tago."

"Tute ne konfuze," diris la raŭpo.

"Nu, eble vi ankoraŭ ne spertis tion," diris Alico, "sed kiam vi devos fariĝi krizalido, sciu, kaj poste fariĝi papilio, mi kredas ke ankaŭ vi havos iom konfuzan senton, ĉu ne?"

"Neniel," diris la raŭpo.

"Nu," diris Alico, "mi scias nur ke mi multe konfuziĝus."

"Vi!" diris la raŭpo senrespekte, "kiu estas vi?"

Tio revenigis ilin al la komenco de la konversacio: Alicon iom irritis la tre mallongaj komentoj de la raŭpo, kaj ŝi etendis sin kaj diris tre serioze, "mi opinias ke vi devus diri al mi kiu vi estas, unue."

"Kial?" diris la raŭpo.

Jen nova konfuza demando: kaj ĉar Alico ne povis diri bonan kialon, kaj la raŭpo ŝajne

estis tre malbonhumora, ŝi turnis sin kaj formarŝis.

"Revenu!" la raŭpo vokis al ŝi, "mi volas diri ion gravan!"

Tio sonis promesoplena: Alico turnis sin kaj revenis.

"Ne koleru," diris la raŭpo.

"Ĉu jen ĉio?" diris Alico, englutante laŭeble sian koleron.

"Ne," diris la raŭpo.

Alico decidis ke eble estas dezirinde atendi, ĉar nenio alia estas farenda, kaj eble la raŭpo fine diros al ŝi ion aŭskultindan. Dum pluraj minutoj ĝi fumadis sian nargileon sen paroli, sed fine ĝi malkrucis siajn brakojn, reprenis la nargileon el sia buŝo, kaj diris "do vi opinias ke vi ŝanĝiĝis, ĉu?"

"Jes, sinjoro," diris Alico, "mi ne povas memori aferojn kiujn mi antaŭe sciis — mi provis diri 'Car jen l' abelo laborema' sed ĝi fariĝis tute diferenca!"

"Provu deklamu 'Vi estas maljuna, Patro Vilhelmo'," diris la raŭpo.

Alico kunmetis siajn manojn, kaj komencis:

1.

"Vi estas maljuna, ho Patro Vilhelmo,
Kaj via hararo nun estas tre blanka:
Sed vi staras sur l' kalva kapo sen helmo—
Ĉu estas enkape io nun manka?"

2.

"Junece," la patro diris al l' filo,
"Mi kredis ke tio damaĝus la cerbon:
Nun maljuna mi scias ke mankas pensilo,
Do mi staras surkape kaj manĝas la herbon."

3.

"Vi estas maljuna, mi diris ĝin jame,
Kaj tro da manĝaĵoj nun faris vin dika:
Sed vi saltas transkapen tra l' pordon tutsame
Kiel dumjune; ĉu vere vi trovas ĝin ŝika?"

4.

"Junece," l' aĝulo deklaris, "kun ĝuo
Per ŝmiraĵo malkara l' artikojn flekseblaj
Mi tenis; nur pagu ŝilingon por duo
Da ujoj, por uzi sur viaj tre feblaj."

5.

"Vi estas maljuna, l' makzeloj malfortas
Por ion tramordi pli duran ol graso:
Sed vi manĝas anseron, eĉ bekon ĝi portas—
Vi kiel sukcesas do maĉi la mason?"

6.

"Junece," la patro respondis al l' knabo,
"Kun l' edzino pri juro mi longe disputis;
La sekvan muskolan kapablon aĝrabo
Ne povis forpreni, l' anseron atutis."



7.

"Vi estas maljuna, sed en tiu fazo
Per okuloj jam feblaj vi spite maljunon
Lerte ĵonglas angilon surpinte de l' nazo—
Vi kiel novaĵon ĉi metis sub sunon?"

8.

"Mi respondis trifoje, kaj tio sufiĉas,"
Al li diris la patro, "vi tro arogante
Ŝajne kredas: malŝpari la tempon mi riĉas!
Piedbaton ricevos do vi elegante!"

"Vi erare deklamis tion," diris la raŭpo.

"Ne tute ĝuste, mi agnoskas," diris Alico timide, "kelkaj vortoj ŝanĝiĝis."

"Vi fuŝis ĝin de la komenco ĝis la fino," diris la raŭpo firme, kaj daŭris silento dum pluraj minutoj: la raŭpo la unua parolis.

"Kiom granda vi volas esti?" ĝi demandis.

"Nu, ne gravas vere la grandeco," Alico rapide respondis, "sed ne plaĉas tiom ofte ŝanĝiĝi, sciu."

"Ĉu vi estas kontenta nun?" diris la raŭpo.

"Nu, mi preferus esti iomete pli granda, sinjoro, se ne ĝenus vin," diris Alico, "ok centimetroj estas aĉa grandeco."

"Ĝi estas vere tre bona grandeco!" diris la raŭpo kolere, etendante sin supren dum ĝi parolis (ĝi estis precize ok centimetrojn longa).

"Sed mi ne kutimas al ĝi!" pledis povra Alico per kompatiga tono, kaj ŝi pensis "se nur la bestoj ne tiom facile ofendiĝus!"

"Vi kutimiĝos dum la forpaso de tempo," diris la raŭpo, kaj ĝi metis la nargileon en sian buŝon, kaj rekomencis fumi.

Ĉifoje Alico atendis pacience ĝis ĝi decidis denove paroli: post kelkaj minutoj la raŭpo

prenis la nargileon el sia buŝo, kaj malsuprenenivis de la agariko, kaj forrampis en la herbon, nur komentante dum ĝi iris: "la suprajo altigos vin, kaj la trunketo malaltigos vin."

"La suprajo de kio? La trunketo de kio?" pensis Alico.

"De la agariko," diris la raŭpo, tutkvazaŭ ŝi parolis pervoĉe, kaj post plia momento ĝi estis ekster ŝia vidpovo.

Alico restis kontemplante la agarikon dum minuto, kaj post tio ŝi plukis ĝin kaj zorge rompis ĝin en du partojn, prenante la tigon per unu mano, kaj la suprajon per la alia. "Kion faras la trunketo?" ŝi diris, kaj manĝetis eron por provi: la sekvan momenton ŝi sentis grandegan baton al sia mentono: ĝi frapis ŝian piedon!

Ŝin multe timigis tiu tre subita ŝanĝo, sed ĉar ŝi ne ŝrumpis plu, kaj ne faligis la suprajon de la agariko, ŝi ankoraŭ ne perdis esperon. Apenaŭ estis sufiĉe da spaco por malfermi la buŝon, ĉar ŝia mentono premis ŝian piedon, sed ŝi fine sukcesis kaj povis demordi ereton de la suprajo de la agariko.

* * * * *

"Jen! mia kapo finfine estas libera!" diris Alico per ĝoja tono, kiu foriĝis alarmtono post plia momento, kiam ŝi trovis ke ŝiaj ŝultroj tute ne estas videblaj: malsupren rigardante ŝi vidis nur enorme longan kolon, kiu ŝajnis leviĝi kiel trunko el maro de verdaj folioj kuŝantaj multe malsupre de ŝi.



"Kio povas esti tiu verdaĵo?" diris Alico, "kaj kien iris miaj ŝultroj? Kaj ho! miaj kompatindaj manoj! kial mi ne povas vidi vin?" Ŝi movadis ilin dum ŝi parolis, sed sekvis ŝajne neniu rezulto, escepte de iometa skuado de la folioj. Post tio ŝi provis movi sian kapon malsupren al siaj manoj, kaj ĝoje trovis ke ŝia kolo estas fleksebla facile ĉiudirekte, kvazaŭ serpento. Ŝi ĵus sukcesis kurbigi ĝin laŭ gracia zigzago, kaj estis preta plonĝi inter la folioj'n, kiujn ŝi trovis esti nur la suproj de la arboj de la arbaro en kiu ŝi vagadis, kiam akra siblado devigis ŝin retiri sin: granda kolombo flugis sur ŝian vizaĝon, kaj batadis ŝin feroce per siaj flugiloj.

"Serpento!" kriegis la kolombo.

"Mi ne estas serpento!" diris Alico indigne, "lasu min!"

"Mi provis ĉion!" diris la kolombo senespere, kun ia ploreto: "ŝajne nenio sufiĉas por ili!"

"Mi tute ne komprenas pri kio vi parolas," diris Alico.

"Mi provis la radikojn de arboj, kaj mi provis bordojn, kaj mi provis heĝojn," la kolombo pludiris sen atenti ŝin, "sed la serpentoj! Nenio kontentigas ilin!"

Por Alico estis pli kaj pli enigme, sed ŝi opiniis ke ne utilus denove paroli antaŭ ol la kolombo finos.

"Kvazaŭ ne estus sufiĉe malfacile elkovi la ovojn!" diris la kolombo, "sed mi devas atenti pri serpentoj tage kaj nokte! Mi eĉ ne unu dormeton spertas de tri semajnoj!"

"Mi tre bedaŭras ke vi ĝeniĝis," diris Alico, kiu komencis kompreni ĝin.

"Kaj mi ĵus okpuis la plej altan arbon en la arbaro," pludiris la kolombo fortigante sian voĉon ĝis ĝi fariĝis ŝriko, "kaj mi ĵus ekkredis ke mi fine liberiĝis de ili, sed ili neeviteble venas el la ĉielo! Uĥ! Serpento!"

"Sed mi <u>ne</u> estas serpento," diris Alico. "Mi estas — mi estas —"

"Nu! Kio vi estas?" diris la kolombo. "Mi vidas ke vi provas elpensi ion."

"Mi—mi estas malgranda knabino," diris Alico, iom dube dum ŝi memoris kiom da ŝanĝoj ŝi spertis.

"Tute verŝajne!" diris la kolombo, "mi jam vidis multajn, sed neniam eĉ unu kun kolo kia via! Ne, vi estas serpento, mi tute bone scias tion! Mi supozas ke vi diros al mi nun ke neniam vi gustumis ovon!"

"Mi ja gustumis ovojn, certe," diris Alico, kiu estis tre verema infano, "sed mi ne volas viajn. Al mi ne plaĉas nekuiritaj."

"Nu, foriru do!" diris la kolombo, kaj ĝi rekomfortigis sin en sia nesto. Alico kaŭriĝis inter la arboj laŭeble, ĉar ŝia kolo plurfoje implikiĝis inter la branĉoj, kaj plurfoje ŝi devis halti kaj liberigi ĝin. Baldaŭ ŝi memoris ke ŝi plu tenas la agarikerojn en la manoj, kaj tre zorge ŝi ekmordetis, unue unu pecon kaj poste la alian, kelkfoje altiĝante kaj kelkfoje malaltiĝante, ĝis ŝi sukcesis reatingi sian normalan alton.

Jam de tiom longe ŝi ne estis ĝuste

granda ke unue la sento estis tre stranga, sed ŝi plene kutimiĝis post unu aŭ du minutoj, kaj komencis paroli al si kiel kutime: "nu! jen duono de miaj planoj nun estas realigitaj! Kiom konfuzas tiom da ŝanĝiĝoj! Mi neniam certas kia mi estos, de unu minuto ĝis alia! Tamen, mi reakiris mian ĝustan altecon: la sekva tasko estas eniri tiun belan ĝardenon—kiel fari tion?"

Dirante tion, ŝi rimarkis ke unu el la arboj havas pordejon kiu kondukas rekte en ĝin. "Tre kurioze!" ŝi pensis, "sed ĉio estas kurioza hodiaŭ: nu, mi eniru." Kaj ŝi eniris.

Denove ŝi trovis sin en la longa halo, kaj proksima al la malgranda vitra tablo: "nun, mi sukcesos pli bone ĉifoje," ŝi diris al si, kaj komencis prenante la malgrandan oran ŝlosilon kaj malŝlosante la pordon kiu kondukis en la ĝardenon. Post tio ŝi ekkomencis mordeti la agarikerojn ĝis ŝi fariĝis ĉirkaŭ tridek kvin centimetrojn alta: post tio ŝi marŝis laŭ la malgranda koridoro: kaj post tio—ŝi finfine trovis sin en la bela ĝardeno, inter la brilantaj florbedoj kaj la malvarmaj fontoj.



Ĉapitro IV



Granda rozarbo staris apud la enirejo de la ĝardeno: la rozoj kreskantaj sur ĝi estis blankaj, sed tri ĝardenistoj okupe kolorigadis ilin ruĝaj. Alico opiniis tion tre kurioza, kaj ŝi proksimiĝis por rigardi, kaj ĝuste kiam ŝi estis apud ili, ŝi aŭdis unu el ili diri "atentu, Kvin! Ne verŝu farbon sur min tiel!"

"Ne mi kulpas," diris Kvin per paŭta tono. "Sep frapis mian kubuton."

Je tio Sep suprenrigardis kaj diris, "jes ja, Kvin! Ĉiam akuzu aliajn!"

"Vi ne parolu!" diris Kvin, "jam hieraŭ

mi aŭdis la Reĝinon diri ke ŝi pripensas senkapigi vin!"

"Pro kio?" diris la unua parolinto.

"Tute ne koncernas vin, Du!" diris Sep.

"Jes, ja koncernas lin!" diris Kvin, "kaj mi informos lin: estis ĉar vi portis al la kuiristino tulipradikojn anstataŭ terpomojn."

Sep forĵetis sian brosonkaj ĵus komencis diri, "nu! El ĉiaj maljustaj—" kiam lia okulo ekvidis Alicon, kaj li subite ĉesis paroli: la aliaj turnis sin por rigardi, kaj ili ĉiuj deprenis siajn ĉapelojn kaj profunde klinis sin.

"Bonvolu diri al mi, mi petas," diris Alico timide, "kial vi farbas tiujn rozojn?"

Kvin kaj Sep rigardis Dun, sed diris nenion: Du komencis diri, per nelaŭta voĉo, "nu, Fraŭlino, la fakto estas ke ĉi tiu devis esti ruĝa rozarbo, kaj ni erare enmetis blankan, kaj se la Reĝino ekscius, ni ĉiuj trovus niajn kapojn dehakitaj. Do, komprenu, ni laŭeble strebas, antaŭ ŝia reveno—" Tiumomente Kvin, kiu maltrankvile transrigardadis la ĝardenon, elkriis "la

Reĝino! la Reĝino!" kaj la tri ĝardenistoj tuj ĵetis sin survizaĝe. Sonis multaj piedpaŝoj, kaj Alico turnis sin, fervora vidi la Reĝinon.

Unue venis dek soldatoj portantaj bastonojn: ĉiuj estis laŭforme similaj al la tri ĝardenistoj, plataj kaj oblongaj, kun la manoj kaj piedoj ĉe la anguloj: sekvis la dek korteganoj; ili ĉiuj estis ornamitaj tute per karoo, kaj marŝis duope, same kiel la soldatoj. Post ili sekvis la Reĝaj infanoj: ili estis dek, kaj la karuletoj venis gaje saltetante, man-en-mane: ili ĉiuj estis ornamitaj per koroj. Sekvis la gastoj, plejparte reĝoj kaj reĝinoj, kaj inter ili Alico rekonis la blankan kuniklon: ĝi paroladis rapide kaj nervoze, ridetis pro ĉio dirita, kaj preterpasis sen rimarki ŝin. Sekvis la Fanto de Koroj, portante la kronon de la Reĝo sur kuseno, kaj, lastaj en ĉi tiu granda procesio, venis LA REĜO KAJ LA REĜINO DE KOROJ.

Kiam la procesio atingis la lokon de Alico, ili ĉiuj haltis kaj rigardis ŝin, kaj la Reĝino diris severe, "kiu estas tiu?" Ŝi diris



tion al la Fanto de Keroj, kiu nur klinis sin kaj ridetis responde.

"Idioto!" diris la Reĝino, levante sian nazon, kaj ŝi demandis al Alico, "kiel vi nomiĝas?"

"Mi nomiĝas Alico, plaĉu al via Moŝto," diris Alico tre aŭdace, ĉar ŝi pensis "ho, ili estas nur ludkartaro! Ne necesas timi ilin!"

"Kiuj estas tiuj?" diris la Reĝino, indikante la tri ĝardenistojn kuŝantajn ĉirkaŭ la rozarbo, ĉar, pro tio ke ili kuŝis survizaĝe, kaj la ilustraĵo sur iliaj dorsoj estis sama kiel tiu sur la ceteraj kartoj, ŝi ne povis scii ĉu ili estas ĝardenistoj, aŭ soldatoj, aŭ korteganoj, aŭ tri el ŝiaj propraj infanoj.

"Kiel mi scius?" diris Alico, kaj ŝin surprizis ŝia propra kuraĝo, "ne koncernas min."

La Reĝino fariĝis karmezina pro furiozo, kaj, rigardinte ŝin kolere dum minuto, ŝi komencis tondre krii, "senkapigu —"

"Absurdaĵo!" diris Alico, tre laŭte kaj decideme, kaj la Reĝino silentiĝis.

La Reĝo metis sian manon sur ŝian brakon kaj diris timide, "memoru, kara! Ŝi estas nur infano!"

La Reĝino forturniĝis kolere de li kaj diris al la Fanto, "turnu ilin!"

La Fanto obeis, tre zorge, per unu piedo.

"Stariĝu!" kriis la Reĝino per akra, laŭta voĉo, kaj la tri ĝardenistoj tuj eksaltis, kaj komencis riverenci al la Reĝo, la Reĝino, la Reĝaj infanoj, kaj ĉiu alia.

"Ĉesigu tion!" kriegis la Reĝino, "vi kapturnigas min." Kaj, turninte sin al la rozarbo, ŝi pludiris "kion vi faradis ĉi tie?"

"Plaĉu al via Moŝto," diris Du per tre humila tono, surgenuiĝante dum li parolis, "ni penis —"

"Mi vidas!" diris la Reĝino, kiu intertempe ekzamenadis la rozojn, "senkapigu ilin!" kaj la procesio plu marŝis, tri el la soldatoj postrestis por ekzekuti la tri povrajn ĝardenistojn, kiuj kuris al Alico por protektiĝi.

"Oni ne senkapigos vin!" diris Alico, kaj ŝi metis ilin en sian poŝon: la tri soldatoj marŝis unufoje ĉirkaŭ ŝin, serĉante ilin, kaj poste trankvile formarŝis por reatingi la aliajn.

"Ĉu vi senkapigis ilin?" kriis la Reĝino.

"Iliaj kapoj estas for," la soldatoj kriis respondo, "plaĉu al via Moŝto!"

"Bone!" kriis la Reĝino. "Ĉu vi scias ludi kroketon?"

La soldatoj silentis kaj rigardis Alicon, ĉar la demando evidente celis ŝin.

"Jes!" kriis Alico plej laŭte.

"Venu, do!" muĝis la Reĝino, kaj Alico eniris la procesion, multe demandante al si kio post nun okazos.

"Estas — estas tre bela tago!" diris timida voĉeto apud ŝi: ŝi marŝadis apud la blanka kuniklo, kiu rigardetis malkviete ŝian vizaĝon.

"Tre," diris Alico, "kie estas la Markizino?"

"Ĉit, ĉit!" diris la kuniklo per mallaŭta voĉo, "ŝi aŭdos vin. La Reĝino estas la Markizino: ĉu vi ne scias tion?"

"Ne, mi ne scias," diris Alico, "de kio?"

"Reĝino de Koroj," diris la kuniklo flustre, metante sian buŝon apud ŝian orelon, "kaj Markizino de Falsĥeloncoj."

"Kio estas *ili*?" diris Alico, sed ne estis sufiĉa tempo por la respondo, ĉar ili jam atingis la kroketludejon, kaj la ludo tuj komenciĝis.

Alico opiniis ke neniam ŝi vidis tiom kuriozan kroketludejon dum sia tuta vivo: ĝi konsistis tute el kresteto j kaj sulkoj: la kroketkugloj konsistis el vivantaj erinacoj, la maleoj el vivantaj strutoj,

kaj la soldatoj devis fleksi sin, kaj stari sur siaj piedoj kaj manoj, por esti la arkoj.

La ĉefa malfacilaĵo kiun trovis unue Alico estis manipuli sian struton: ŝi sukcesis sufiĉe komforte aranĝi ĝian korpon

sub sian brakon, kun la kruroj pendantaj, sed plejofte, ĝuste kiam ŝi sukcesis bone rektigi la kolon, kaj pretis bati per ĝia kapo, ĝi insiste torde turnis sin kaj rigardis ŝian vizaĝon kun tia esprimo de senkompreno ke ŝi ne povis ne ekridi: kaj kiam ŝi sukcesis subenigi ĝian kapon, kaj estis preta rekomenci, tre konfuzis ŝin trovi ke la erinaco jam malruliĝis kaj forrampas: krom ĉio ĉi, kutime kresteto aŭ sulko blokis ŝin kien ajn ŝi volis bati la erinacon, kaj ĉar la fleksitaj soldatoj konstante rektigis sin kaj marŝis al aliaj

partoj de la ludejo, Alico baldaŭ konkludis ke vere la ludo estas tre malfacila.

La ludantoj ĉiuj ludis samtempe sen atendi siajn vicojn, tutdume kverelante plej laŭtavoĉe, kaj post tre malmultaj minutoj la Reĝino furiozis, kaj ĉirkaŭ-stamfadis kriante, "senkapigu lin!" aŭ "senkapigu ŝin!" proksimume ĉiuminute. Ĉiujn kondamnitojn arestis la soldatoj, kiuj komprenеble devis ĉesi esti arkoj por fari tion, tiel ke post proksimume duona horo plene mankis arkoj, kaj ĉiuj ludantoj, escepte de la Reĝo, la Reĝino, kaj Alico, estis arestitaj kaj ekzekutotaj.

La Reĝino ĉesis ĉirkaŭkuradi, tute senspire, kaj diris al Alico, "ĉu vi renkontis la Falsĥelonion?"

"Ne," diris Alico, "mi eĉ ne scias kio estas Falsĥelonio."

"Venu do," diris la Reĝino, "kaj ĝi rakontos al vi sian historion."

Dum ili kune formarŝis, Alico aŭdis la Reĝon diri per nelaŭta voĉo al la tuta grupo, "vi ĉiuj estas pardonitaj."

"Nu, tio estas bona!" pensis Alico,

kiun tre malfeliĉigis la nombro da ekzekutoj ordonitaj de la Reĝino.

Tre baldaŭ ili atingis Grifon, kiu kuŝis dormante en la sunlumo: (se vi ne scias kio estas Grifo, rigardu la bildon): "vigligu vin, pigrulo!" diris la Reĝino, "kaj konduku ĉi tiun junulinon por renkonti la Falsĥelonion, kaj por aŭdi ĝian historion. Mi devas reiri por prizorgi kelkan ekzekutojn kiujn mi ordonis," kaj ŝi formarŝis, lasante Alicon sola kun la Grifo. Al Alico la besto tute ne aspektis agrabla, sed ĝenerale ŝi opinicis ke estos egale sendanĝere resti kiel sekvi tiun sovaĝan Reĝinon: do ŝi atendis.

La Grifo sidiĝis kaj frotis siajn okulojn: post tio ĝi rigardis la Reĝinon ĝis ŝi estis ne plu videbla: kaj post tio ĝi ridklukis. "Kia amuzo!" diris la Grifo, duone al si, duone al Alico.

"Kio amuzas?" diris Alico.

"Nu, ŝi," diris la Grifo; "ŝi nur imagas, ja: oni neniam ekzekutas neniun, komprenu: venu!"

"Ĉiu diras 'venu!' ĉi tie," pensis Alico, dum ŝi malrapide marŝis sekvante la Grifon; "neniam dum mia tuta vivo oni tiom ordonis al mi — neniam!"

Ili ne tre longe marŝis antaŭ ol vidi el for la Falsĥelonion, kiu sidis malfeliĉe kaj sole sur malgranda roka breto, kaj, dum ili proksimiĝis, Alico povis aŭdi ĝin ĝemadi kvazaŭ ĝia koro rompiĝos. Ŝi profunde kompatis ĝin: "pro kio ĝi malfeliĉas?" ŝi demandis al la Grifo, kaj la Grifo respondis, per vortoj preskaŭ identaj kun la antaŭaj, "li nur imagas, ja: li ne havas nenian malfeliĉon, komprenu: venu!"

Do ili iris al la Falsĥelonio, kiu rigardis ilin per grandaj okuloj plenaj de larmoj, sed diris nenion.

"Ĉi tiu ĉi junulino," diris la Grifo, "ŝi

volas por koni vian historion, tion ŝi volas."

"Mi rakontos ĝin al ŝi," diris la Falŝhelonio, per profunda kava tono, "sidiĝu, kaj ne parolu antaŭ ol mi finos."

Do ili sidiĝis, kaj neniu parolis dum pluraj minutoj: Alico pensis "mi ne komprenas kiel li povos fini, se li ne komencos," sed ŝi atendis pacience.

"Iam," diris la Falŝhelonio fine, kun profunda ĝemo, "mi estis vera Ĥelonio."

Tiujn vortojn sekvis tre longa silento, kiun interrompis nur fojfoja krieto "hjckrrh!" de la Grifo, kaj la konstanta profunda plorado de la Falŝhelonio. Alico preskaŭ stariĝis kaj diris, "dankon, sinjoro, pro via tre interesa rakonto," sed ŝi pensis ke neeviteble devas esti pli, do ŝi sidis kviete kaj diris nenion.

"Kiam ni estis junaj," la Falŝhelonio daŭrigis, pli trankvile, kvankam li ankoraŭ fojfoje ploris, "ni lernis en lernejo en la maro. La mastro estis maljuna Ĥelonio — ni kutime nomis lin Testudo —"

"Kial vi nomis lin Testudo, se li ne estis tio?" demandis Alico.

"Ni nomis lin Testudo ĉar li testis nin," diris la Falsĥelonio kolere, "vere vi estas stulta!"

"Vi devus honti farante tiom simplan demandon," aldonis la Grifo, kaj ili ambaŭ sidis silente kaj rigardis kompatinde Alicon, kiu sentis sin preta subiĝi en la teron: fine la Grifo diris al la Falsĥelonio, "plu rakontu, oldulo! Ne perdu la tutan tagon!" kaj la Falsĥelonio daŭrigis per ĉi tiuj vortoj:

"Vi eble ne multe loĝis sub la maro—" ("ne," diris Alico), "kaj eble oni neniam konatigis al vi omaron—" (Alico komencis diri "mi iam gustumis—" sed haltigis sin rapide, kaj diris, "ne, neniam," anstataŭe), "do vi tute ne povas koncepti kiom plezuriga estas Omara Kvadrilo!"

"Tute ne," diris Alico, "kio ĝi estas?"

"Nu," diris la Grifo, "oni unue envicigas laŭlonge de la marbordo—"

"Du vicoj!" kriis la Falsĥelonio, "fokoj, ĥelonioj, salmoj, kaj la ceteraj—antaŭen pasu dufoje—"

"Ĉiu kun omaro kiel partnero!" kriis la Grifo.

"Kompreneble," la Falŝelonio diris, "antaŭenpaŝu dufoje, turnigu al partneroj—"

"Interŝanĝu omarojn, kaj retreniru samorde," interrompis la Grifo.

"Post tio, komprenu," pludiris la Falŝelonio, "ĵetu la—"

"La omarojn!" kriis la Grifo, saltante en la aeron.

"Kiel eble plej foren en la maron—"

"Naĝe sekvu ilin!" kriegis la Grifo.

"Transkapen saltu en la maro!" kriis la Falŝelonio, kapriolante senrezerve.

"Denove interŝanĝu omarojn!" kriis la Grifo plej laŭte, "kaj—"

"Estas finite," diris la Falŝelonio, subite nelaŭtigante sian voĉon, kaj la duloj, kiuj ĝis tiam ĉirkaŭsaltadis freneze, residiĝis tre malfeliĉe kaj silente, kaj rigardis Alicon.

"Sendube la danco estas tre bela," diris Alico timide.

"Ĉu vi deziras vidi kom el ĝi?" diris la Falŝelonio.

"Tre fervore," diris Alico.

"Jen, ni provu la unuan parton!" diris la Falŝelonio al la Grifo, "ni povas danci

sen la omaroj, komprenu. Kiu el ni kantu?"

"Ho! *vi* kantu," diris la Grifo, "mi forgesis la vortojn."

Do ili komencis solene danci ĉirkaŭ

Alicon, fojfoje tretante ŝiajn piedfingrojn kiam ili tro proksimiĝis, kaj gestante per siaj antaŭpiedoj por bati la tempojn, dum la Falsĥelonio kantis ĉi tiujn vortojn, tre malrapide kaj morne:

"Sub la akvoj de la maro
Abundas dense omararo —
Danci estas la amfaro,
Mia propra kara Salmo!"

La Grifo kunkantis la refrenon:

"Salmo supren! Salmo suben!
Salmo tordu vian voston!
De ĉiuj fiŝoj en la maro
Ja superas ĉiujn Salmo!"

"Dankon," diris Alico, feliĉa pro la finiĝo de la dancero.

"Ĉu ni provu la duan parton?" diris la Grifo, "aŭ ĉu vi preferas kanton?"

"Ho, kanton mi petas!" Alico respondis, tiom fervore, ke la Grifo diris per tono indikanta ofendiĝon, "hm! vere nekredeble gusto! Kantu por ŝi 'Falsĥelonia Supo', oldulo!"

La Falsĥelonio ĝemis profunde, kaj komencis, per voĉo kelkfoje sufokita de plorado, kanti ĉi tion:

"Verda kaj riĉa Supo bela
Atendas ĝi en ujo hela!
Ĝin trinkus ĝoje eĉ la lupo!
Sup' de l' vespero, bela Supo!
Sup' de l' vespero, bela Supo!
Be—la Su—po!
Be—la Su—po!
Su—up' de l' ves—pe—ro,
Bela, bela Supo!"

"Denove la refrenon!" kriis la Grifo, kaj la Falsĥelonio ĵus komencis ripeti ĝin,

kiam la krio "komenciĝas la proceso!" aŭdiĝis el for.

"Venu!" kriis la Grifo, kaj prenante Alicon per la mano, li forrapidis, sen atendi la finon de la kanto.

"Kiu proceso estas?" anhelis Alico dum ŝi kuris, sed la Grifo nur respondis "venu!" kaj kuris des pli rapide, kaj pli kaj pli fade venis, portate de la venteto sekvanta ilin, la melankoliaj vortoj:

"Su—up' de l' ves—pe—ro,
Bela, bela Supo!"

La Reĝo kaj la Reĝino sidis sur sia trono kiam ili alvenis, kaj granda amaso da uloj ĉirkaŭis ilin: la Fanto estis ĉenita: kaj antaŭ la Reĝo staris la blanka kunkilo, kun trumpeto en unu mano, kaj pergamena rulaĵo en la alia.

"Heroldo! legu la akuzon!" diris la Reĝo.

Je tio la blanka kuniklo trifoje sonigis la trumpeton, kaj poste malrulis la pergamenan rulaĵon, kaj legis ĉi tion:

"Reĝino Kera dum tag' somera
Tortaron faris ŝi:
Kaj Fanto Kera dum tag' somera
Forŝtelis tortojn li!"

"Nun la ateston," diris la Reĝo, "kaj poste la kondamnon."

"Ne!" diris la Reĝino. "Unue la kondamnon, kaj poste la ateston!"



"Absurde!" kriis Alico, tiom laŭte ke ĉiu eksaltis, "kiel oni povas unue kondamni?"

"Silentu!" diris la Reĝino.

"Mi rifuzas!" diris Alico, "vi estas nur pako da kartoj! Kiu atentas vin?"

Je tio la tuta kartaro ekleviĝis en la aeron, kaj iris fluge kontraŭ ŝin: ŝi krietis pro timo, kaj klopodis forbati ilin, kaj trovis sin kuŝanta sur la bordo, kun la kapo sur la genuoj de sia fratino, kiu milde debrosis kelkajn foliojn kiuj falis de la arboj sur ŝian vizaĝon.

"Vekiĝu, Alico kara!" diris ŝia fratino, "nu, vi ja bele longe dormis!"

"Ho, mi havis tre kuriozan sonĝon!" diris Alico, kaj ŝi rakontis al sia fratino ĉiujn siajn strangajn Aventurojn Sub la Tero, kiel vi jus legis ilin, kaj kiam ŝi finis, ŝia fratino kisis ŝin kaj diris, "ĝi estis kurioza sonĝo, kara, certe! Sed nun kuru en la domon por manĝi: malfruiĝas."

Do Alico forkuris, pensante dum la kuro (laŭeble) pri kia mirinda sonĝo ĝi estis.

Sed ŝia fratino iom plu sidis tie, rigardante la malleviĝantan sunon, kaj pensante pri malgranda Alico kaj ŝia Aventuroj, ĝis ankaŭ ŝi komencis kvazaŭ sonĝi, kaj jen ŝia sonĝo:

Ŝi vidis antikvan urbon, kaj trankvilan riveron serpentumantan proksime laŭlonge de la ebenaĵo, kaj suprenglitis laŭ la fluo boato kun gaja grupo de infanoj en si—ŝi povis aŭdi iliajn voĉojn kaj ridadon kvazaŭ muzikon trans la akvo—kaj inter ili estis alia malgranda Alico, kiu sidis aŭskultante kun brilantaj fervoraj okuloj la rakonton rakontatan, kaj ŝi aŭskultis la vortojn de la rakonto, kaj jen! ĝi estis la sonĝo de ŝia

propra fratineto. Do la boato malrapide veturadis, sub la brila somertago, kun sia gaja anaro kaj sia muziko el voĉoj kaj ridado, ĝis ĝi ĉirkaŭiris unu el la multaj kurbiĝoj de la fluo, kaj ŝi ne plu vidis ĝin.

Post tio ŝi pensis, (kvazaŭ en sonĝo en la sonĝo), ke tiu sama malgranda Alico, dum posta epoko, mem estos kreskinta virino: kaj ke ŝi konservos, dum siaj pli maturaj jaroj, la simplan kaj amantan koron de sia infaneco: kaj ke ŝi grupigos ĉirkaŭ sin aliajn malgrandajn infanojn, kaj instigos iliajn okulojn fariĝi brilaj kaj fervoraj per multaj mirindaj rakontaj, eble eĉ per ĉi tiuj aventuroj mem de la malgranda Alico antikva: kaj ke ŝi kunsentos ĉiujn ilian simplajn dolorojn, kaj trovos plezuron pro ĉiuj iliaj simplaj ĝojoj, memorante sian propran infanvivon, kaj la felicajn somertagojn.